# *Venezuelo kaptis 14 membrojn de la pormilita kolombia grupo Los Rastrojos*




Karakaso, feb 18 (RHK) La a?toritatuloj de Venezuelo informis ke estis kaptitaj 14 membroj de la pormilita kolombia grupo Los Rastrojos, en la sektoro de Boca de Grita, municipo García de Hevia de la ?tato Táchira, landlima kun Kolombio.

Fredy Bernal, nomumita de la prezidanteco de Venezuelo por gvidi la proceduron, informis pri la nuligo de tiu pormilita grupo en la regiono.

Krome, la a?toritatuloj de Venezuelo intervenis hotelon en “Boca de Grita”, kiu savgardis dan?erajn membrojn de la pormilita grupo, kaj disigis “improvizitan flegejon”, kiu estis uzita por doni unuajn helpojn al la kolombiaj pormilitaristoj.

Bernal aldonis kromajn detalojn, rilate al trovo de armo-vendejo, kiu konservis kaj pliigis la armilojn de tiu pormilita grupo kolombia. En tiu loko oni eltrovis “armilojn, municiojn, porteblajn telefonojn kaj eksplodmaterialojn”, oni kaptis 20 vehiklojn.

Bernal asertis ke ili ne ripozos ?is forpeli ?iujn militajn grupojn de la landlimo, ?ar “ili estas kiel armitaj brakoj de politikaj agantoj de la dekstrularo por semi perforton en la teritorio".

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/214717-venezuelo-kaptis-14-membrojn-de-la-pormilita-kolombia-grupo-los-rastrojos

Radio Habana Cuba